**R.P. Christie, Saskatoon, Sask.**, donis kvin-minutan prezentadon de Esperanto antaŭ la "Asocio de Studintoj de Gale Carnegie", la 10-an de Februaro. Dum la kunveno li disdonis la malgrandan PGL-libreton.

**Du novaj interesaj libroj** estas eldonitaj antaŭnelonge de membroj de EANA: *S-ro R. Paul Montgomery*, kiu deĵoris dum multaj jaroj kiel misiisto en Ĉinujo, eldonis ilustritan libron "Study-at-Home-English". La libro estas destinita por helpi al orientuloj nun en Usono kaj al portorikanoj lerni la anglan lingvon. Diversfoje Esperanto estas menciata. Interesuloj povas skribi rekte al *S-ro Montgomery, c/o Friends Bookstore, 302 Arch St., Philadelphia 6, Pa.* En Washington, D.C., *S-ro E.G. Dodge* raportas, ke lia nova filozofia libro "Bold Thoughts on Life" trovis sukcesan eĥon inter diversaj personoj tra Usono. Interesuloj bonvolu kontakti lin: *E.G. Dodge, 1471 Irving St., N.W., Washington 10, D.C.*

**Internaciaj Kursoj en Esperanto, 1952:** (1) Internacia Kurso pri "La Nuntempa Svedlando" kun subteno de la Sveda registaro, en altlernejo apud Göteborg, Svedlando. La kurso okazos 27 Julio-2 Aŭgusto. Inkluziva kosto \$15. (2) Internaciaj FERIAJ Kursoj pri Esperanto en Helsingör (Elsinore), Danlando, 25 Julio-1 Aŭgusto, en Popola Altlernejo. Inkluziva kosto \$15-\$18. (3) Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj, en Schluchsee, Germanujo, 17-24 Aŭgusto. Kosto \$15.

**Esperanto en Turismo:** Ni ricevis lastatempe turistbroŝurojn en Esperanto pri la urboj *Bonn* kaj *Köln*, Germanujo, *Oslo*, Norvegujo, kaj *Brugge*, Belgujo. De la *Itala Turisma Klubo* ni ricevis interesan broŝuron en Esperanto pri la kondiĉoj de vojaĝado en Italujo, kaj pri avantagoj akireblaj pere de membreco en la Turisma Klubo. Du turistaj servo eldonas informon en Esperanto pri ekskursoj: *Turista Servo Esperantista* (por okcidenta Eŭropo), Bruselo, Belgujo; kaj *Service Touristiques S.C.E. T.A.*, Toulouse, Francujo, kiu aranĝas specialajnekskursojn al la Andorvalo. *Broŝuro pri Hungarujo en Esperanto*, eldonita de la Ŝtata Turist-Trafika Oficejo, ĵus atingis nin de tiu lando malantaŭ la fera kurteno. Laŭ indiko Hungarujo ne plu estas memstara lando, ĉar la broŝuro ja titoliĝas "La Hungara Provinco". Ŝajne tre taŭga montrilo de la nunaj politikaj faktoj!



## ESPERANTO - KRONIKO

**S-ro Charles E. Merrill**, Worcester, Mass., kies foto troviĝas maldekstre, metis artikolon pri Esperanto en lokan ĵurnalon kaj anoncis, ke li volonte instruos Esperanton senpage al interesuloj. Jam sep ok personoj kontaktis lin por lerni Esperanton.

**Pastro D-ro J.B. Se-Tsien Kao, O.F.M.**, fama ĉina edukisto kaj verkisto, pasigis kelkajn horojn en San Francisco kaj New York en Aprilo, dum aeroplana vojaĝo de Hong Kong al Buenos Aires. En New York li havis mallongan interparolon kun D-ro William Solzbacher, Prezidanto de EANA. Li petis lin, transdoni liajn sincerajn salutojn al ĉiuj liaj gemikoj en Nord-Ameriko. Dum la pasinta jaro D-ro Kao vivis unue en Lima, Peruo, poste en Hong Kong. Li nun restos dum kelka tempo en Argentino. Ĉie li fervore helpas la Esperanto-movadon.

**Nova Esperanto-Grupo de studentoj** fondiĝis en la Altlernejo "MacKenzie" en Detroit, Mich. Je la unua kunveno ĉeestis 21 personoj. *F-ino Janice Gollwitzer* estas la konsilantino. *Bruce Pray*, studento en la altlernejo, iniciatis la tutan aferon. Gratulon pro bonega laboro!

**Beatrice E. Ruff, el Spencer, Iowa**, anoncas sian edziniĝon je la 9-a de Aprilo al *Nels Henry Nelson*. Al la nova paro ni deziras feliĉon.

**En la YMCA, Lancaster, Pa.**, malfermiĝis nova kurso de Esperanto sub instruo de *Profesoro F.C. Neumann*. La kurso estas sub la aŭspicio de la Kolegio Elizabethtown, kiu kolegio pasintaŭtune enkondukis oficialan kurson de Esperanto en sian propran studprogramon.

**En Newport, Washington**, estas organizita nova studgrupo sub la gvidado de *Pastro Ray W. Mason*. Samideano Mason lernis Esperanton antaŭ kvardek jaroj, sed nur freŝdate denove reaktiviĝis pri nia afero. Al la nova grupo EANA deziras multan sukceson.

**En Newark, N.J.**, D-ro *George A. Maggio* organizis novan kurson de Esperanto por dek-kvin membroj de la Klubo Leonoj (Lions), kaj proksimume dudek aliaj personoj, inter kiuj troviĝas kvar fratulinoj, kaj kuracistoj kaj flegistinoj de la hospitalo St. Michaels.

**La tagĵurnalo "The Oregonian", Portland, Ore.**, publikigis "Leteron al la Redaktoro", subskribita de *S-ro Leo Tanaka*. S-ro Tanaka komentis pri la signifo de la sufikso *um* kaj la prepozicio *je* en Esperanto, proponante, ke politikisto eble ŝatus utiligi ilin por respondi al diversaj demandoj, kaj tiel oni ne scius precize, kion li intencas diri!

**Niaj mortintoj:** Pasintvintre mortis nia bonkora kaj dumviva membro, *A.S. Mellichamp*, en Peoria, Illinois. S-ro Mellichamp estis unu el la fondintoj de la Subtena Komitato de EANA. Ni sentas grandan perdon de fidela kaj lojala samideano. Je la 9-a de Februaro en Philadelphia, mortis nia konata samideano *Joseph Dubin*. S-ro Dubin estis malsana dum multaj jaroj, sed daŭre laboris por Esperanto. Je la 9-a de Januaro, mortis en Sandwich, Mass., *S-ro Alfred R. Doten*, bona membro kaj subtenanto de EANA dum pluraj jaroj.

## ESPERANTO-KRONIKO

**"America Today"**, oficiala gazeto de la Usona Inform servo (USIS), publikigis artikolon pri Esperanto, en la ĉinlingva eldono de Januaro. La artikolo estas skribita originale de *W.P. Vatbis*, kaj poste presita en ĉinaj ideografoj. Alfluas al la Centra Oficejo multaj informpetoj de Hong Kong, Taiwan (Formoso), Macao, kaj Indonezio, kelkaj skribitaj ĉinlingve, kion kompreneble ni bone komprenas!!!

**En la Rotaria Klubo, Claremont, N.H.**, la 19-an de Marto, *S-ro Allan Hutcheon* parolis pri Esperanto kaj disdonis propagandilojn.

**Ni bonvenigas** la sekvantajn samideanojn, kiuj nove alvenis en niajn landojn: *S-ino Laura Schaeffer* al St. Paul, Minnesota; *S-ro Ted Dorotik* al Nacmine, Alberta, kaj *S-ro Maximilian Frense* al Winnipeg, Manitoba. Ili nun estas membroj de EANA.

**En la "Pacific Marianist"**, gazeto de la Pacifika Provinco de la Marianista Societo, aperis serio da artikoloj pri Esperanto. Ili estas verkita de nia Havaja membro, *Frato C.C. Cummingsmith*, kiu estas ankaŭ redaktoro de tiu gazeto. Tre lerte kaj konvinke li klarigas la uzon kaj utilon de Esperanto, speciale inter Katolikoj.

**En la kolegio "Pacific Union", Kalifornio**, *S-ro Milton E. Davis* faris prelegon pri Esperanto antaŭ 200 studentoj de la Teologia Fakoj.

**Atestojn de EANA** ricevis lastatempe la sekvantaj personoj: *Senatano H.E. Dillinger* (Atesto pri Lernado); *James Donaldson* kaj *D-rino Margaret Kidder* (Atesto pri Kapableco). Ankaŭ ses studentoj en la kolegio Elizabethtown ricevis Atestojn pri Kapableco.

**Sukcesa "Letero al la Redaktoro"**, skribita de *Richard T. Vineski* aperis en la ĉefa tagĵurnalo en Buffalo, N.Y. *S-ro Vineski* utiligis oportunan momenton kiam loka radio-programo diskutis la problemon de internacia lingvo por emfazi la utilon de Esperanto. *S-ro E. Freeman Yendall* el Kenmore, N.Y., samtempe dissemis informojn pri Esperanto en tiu areo per personaj leteroj. Ĝisdate alvenis pli ol 35 informpetoj al EANA.

**Opal Aldridge**, nova membro, kiu loĝas sur insulo Vashon en la ŝtato Washington, jam enmetis artikoleon pri Esperanto en la lokan ĵurnalon kaj intencas tion fari regule. Dum 10 jaroj *S-ino Aldridge* estis blinda, sed de post kelkaj monatoj ŝi denove povas vidi. La fakton ke ŝi interesiĝas pri Esperanto ni ŝuldas al *S-ino Dorothea Schneider*, ankaŭ nova Esperantistino, en Newport, Oregon.

**En kiu lingvo pensas vi?** Jen interesa demando pri kiun ŝatus aŭdi opiniojn de nia legantaro. Ekzemple, ni submetis tiun demandon al *D-ro Solzbacher*, kiu scipovas paroli naŭ lingvojn kaj legi pli ol dudek, kaj li respondis, "Mi ne estas certa, ke mi pensas en iu ajn lingvo"! Nu — kion vi opinias? Sendu viajn komentojn al ni kaj ni elektos la plej taŭgajn respondojn por estonta presado en AE.



# PRI VERSFARADO EN ESPERANTO

Montagu C. Butler

(El prelego en Januaro ĉe Londona Esperanto-Klubo)

**V**IZITU Esperantan feston. Solkantas fraŭlino. Oni ŝin aplaŭdas — ne pro la belaj vortoj (ĉar por la aŭdanto preskaŭ ĉiu kanto estas “kanto senvorta”), sed pro ŝia personeco, aŭ pro la beleco de la voĉo.

Sekvas parolado. Denove oni aplaŭdas — eble kun entuziasmo. Eĉ se la oratoro estas nur komencanto, oni tamen lin komprenas (kondiĉe, ke li ne *legas* la paroladon). Venas deklamo *proza*, kaj teatraĵo; ankaŭ ilin oni komprenas kaj ĝuas.

Nun iudeklamas poemon. Je la fino oni aplaŭdas — sed *ne* krias “Bis!”. Demandu al aplaŭdinto “Pro kio temis la poemo?” Li respondas “Ĝi estis ja bela! Sed bedaŭrinde, mi tiumomente ne aŭskultis”. Enketo eble monturus, ke malmultaj aŭskultis la poemon tiel admirindan, kaj neniu ĝin komprenis. Oni aŭdis la vortojn, sed ricevis el ili neniun ideon.

Tamen, ĉu Esperanta poemo necese estas nekomprenebla? Ja ne! Esperanto brile taŭgas por poezio. Sed versaĵo, kiun, se ĝi estus verkita proze, ni ĵetus en la korbon, ne estas poezio — eĉ ne, se ĝi troviĝas “en presita libro”. Tro ofte la aŭtoro ignoras la elementojn de versfarado, kaj prezentas al ni fuŝaĵon el neologismoj, elizioj, obskuraĵoj, kaj krudaĵoj ĉiuspecaj. Al poeto, oni pledas, ĉiu peko estas pardonebla. Ĉu ni do miru, ke fine la publiko tediĝas, kaj ĉesas legi verkojn, kiujn pro jama sperto ĝi supozas senvaloraj?

Mi ne estas poeto. Sed mi amas poezion. Por mia propra plezuro mi tradukis milon da poemoj kaj kantoj, kaj verkis amason da versaĵoj. Kaj mi flikis sennombrajn “poemojn” de komencantoj. Pro tio mi humile prezentas ĉi tie la elementajn principojn de versfarado — la minimumon akcepteblan. Se vi obeos ilin, ne sekvos el tio, ke vi verkis poemon, sed se vi ne obeos ilin, vi nepre maltrafos.

Eble vi demandos “Kial vi instruas al ni aferojn memevidentajn?” Nu, en la Esperanto-bibliotekoj troviĝas multaj volumoj de poezio. Dum kvindek jaroj en nia gazetaro aperadis sennombraj versaĵoj. Ho ve! Tro ofte, eĉ se ili ne pekas kontraŭ la elementaj reguloj, abundas makuloj kaj krudaĵoj facile forigeblaj. Troviĝas ja tritiko pura, sed la lolo preskaŭ ĝin sufokas. Miajn konsilojn, tamen, mi nun adresas ne al la loĝantoj sur Parnaso, sed al la komencanto, sopiranta ĝin atingi.

**Celu alten!** Esprimu vian penson kiel eble plej trafe. Ĉiun vorton kritike pesu, laŭtleĝu, kaj poluru. Fine, ne eldonu vian poemon, sed ĝin formetu en ŝrankon. Post kelka tempo ĝin reprenu, relegu, rekritiku, kaj repoluru. La procedo estas senfine ripetebla.

Pli bone estas verki unu majstraĵon, ol cent ordinarajojn. Pri la poeto *Poe* oni skribis: “La paperujo sub lia brako estas tre maldika, sed ĝia enhavo estas de la plej alta kvalito”. Celu meriti la saman laŭdon. Eĉ se vi sukcesos verki ion vere bonan, neniu vin laŭdos — neniu eĉ komprenos vian strebon. Sed tio ne gravas! Estu senkompata por vi *mem*; metu antaŭ vin kiel idealon eĉ neatingeblan alton de perfekteco, kaj por via propra kontentigo strebadi ĝin atingi. Literaturo ne estas nur litera turo!

**Konsiloj al la versfaranto:** Post kelkhora studo de Esperanto-lernolibro, la komencanto kutime sentas urĝon verki poemon. Rimarkinte la

radikojn *angel*, *ĉiel*, li skribas *Vi estas angelo El la ĉielo*, kaj sendas la poemon al "The British Esperantist". Sekve la redakteja korbo konstante pleniĝadas. Pro tio la jenaj konsiloj.

Antaŭ ol verki poemon, demandu al vi, ĉu vi jam estas majstro de prozo. Se ne, kiel vi povas esperi verki poezion? Poezio estas la plej alta formo de literaturo. Multaj ĝin celas, nur malmultaj trafas.

Ne ĉiu versaĵo sen gramatika eraro estas poezio. Necesas ankaŭ iom da sento kaj inspiro. Necesas ankaŭ penso espriminda.

La plena nekomprenebleco ne estas merito. Jen eksperimento! Traduku vian versaĵon en vian nacian lingvon *laŭvorte*. Ĉu la traduko havas sencon? Se ne, forĵetu ĝin. Ĉu la provo estas tro kruela?

Rimoj komenciĝu (a) ĉe la akcentita silabo, kaj (b) per malsama konsonanto. Ekz., *benas*, *donas*, kaj *peti*, *ripeti*, ne rimas. Prefere rimo ne estu nur ripeto de sufikso ("adasado"). Ekz., *temo* pli taŭgas ol *amemo* kiel rimo por *kredemo*. Asonanco (vokala rimo: ekz., *pano*, *kavo*) kaj aliaj kvazaŭrimoj (*vintra*, *cindra*; *ruĝa*, *fuŝa*) ne estas rimoj perfektaj; uzu ilin malofte, nur en okazo de ekstrema bezono.

Ne enmetu superfluan *la*, *do*, *ja*, *jes*, afikson, aŭ alian vorton, nur por ŝtopi ritman truon. Ĉiu vorto havas propran signifon.

Ne metu vortojn negravajn (*la*, *mi*, *de*, *kaj*, k.s.) en lokon gravan, kie ili ricevas fortan akcenton.

Obeu la regulojn de la gramatiko. Pledo de "poeta libereco" ne pardonigas lingvan pekon.

Kiom eble, evitu elizion. Eliziu nur kiam vere necese! La senvestigo de besto estas kutimo barbara. Oni povas diri ĝenerale, ke ju pli da elizio des malpli komprenebla estas la poemo. Laŭtleĝu kaj komparu:

Ĉe l' subir' de l' sun',	Subiris jam la suno,
Aŭ l' aper' de l' lun',	Briladas ora luno;
Estas mort' de l' malĝoj' en l' anim!	Malĝojo enanima mortas for.

Se vi nepre devas elizii, faru tion laŭregule. *Kat'* ne signifas *katoj*, *katon*, *kata*; ĝi signifas nur *kato*. Prefere meti l' nur post *ĉe*, *de*, *je*, *pri*, *pro*, aŭ *tra*. (Ne post *da*, ĉar *da la* estas sence nebla).

El tio sekvas, ke oni devas elekti ritmon konvenan por la lingvo. Alivorte, la linioj devas plejparte finiĝi *ine* (per silabo neakcentita). Tio estas afero ĉefgrava. Laŭ la ritmo de *God Save the King* eĉ Zamenhof ne sukcesis fari belan poemon. (kp. "Fundamenta Krestomatio", paĝo 329).

Tre malfacila tasko en poezio estas fari vere bonajn versaĵojn por infanoj. Jen diversaj specimenoj, kaj simplaj kaj taŭgaj por ili. Kritikumu certe! Sed ĉu vi povus fari tiel bone?

Brilu, brilu, eta stelo!	Ba, Ba, ŝafo!	Bonan nokton,
Diamanto sur ĉielo!	Ĉu vi havas lanon?	Ĉiuĵ vi!
Diru, kiu estas vi,	Jes, tri sakojn!	Al la lito
Tiel alta super ni?	Prenu en la manon.	Iras mi.

Katoj havas molajn felojn,	Jen tre beŝa blanka kato
Du okulojn, du orelojn,	Sur malgranda blua mato;
Kvar piedojn, ruĝan sangon,	Kanjo estas ŝia nomo,
Unu voston, unu langon.	Kaj ŝi loĝas en la domo.

(Ĉi tio estas unua parto de artikolo, finota en sekvonta numero de A.E.)





## SUR LA TABLO — VIANDO

Joseph R. Wheeling

(De la Universitato Lund en Svedujo, ni ricevis oficialan enketon pri ĉevalviando. La jena teatraĵeto estu nia respondo.)

Scenejo: En la manĝambro de gesinjoroj Bell. Lucino kaj Henriko, manĝinte, ankoraŭ sidas ĉe la tablo.

H: Ĉu la oreloj trompas min?

L: Mi ne scias. Kial vi demandas?

H: Ĉu mi ne aŭdis vin proponi, ke ni provu iom da ĉevalviando?

L: Ho, mi nur vidis anoncon en ĵurnalo, kiu diris ke ĝi estas malpli kosta ol bovaĵo, kaj egale bona.

H: Vere, Lucino, vi mirigas min! Mi ne povas imagi, ke iu ajn manĝus ĉevalviandon.

L: Kial tio estus nedeca?

H: Ĉu estas necese, ke mi informu vin? Kio estas ni? Ĉu vulturoj, kiuj manĝas mortintan ĉevalon?

L: Se mi ne eraras, tiu fiŝo, kiun vi manĝis hieraŭ vespere, estis mortinta eble antaŭ du tagoj. Ĉu vi estas, do, kato?

H: Ho, vi tute ne komprenas mian vidpunkton... Ne, Lucino, mi nur volis diri, ke tiu afero estas same kiel manĝi hundon.

L: Kio estas same kiel manĝi hundon? Ĉu via manĝado de mortinta fiŝo?

H: Mia manĝado de... Je la nomo de Ĉielo, Lucino! Pri kio vi babilas?

L: Ne ŝajnu, ke vi ne scias.

H: Nu, rilate manĝadon de ĉevalviando, mi kontraŭas vian opinion.

L: Sed, Henriko, mi ne esprimis opinion. Mi diris, ke ĵurnalo diris...

H: ...ke ĉevalviando estas same bona kiel bovaĵo! Vi diris tion antaŭe.

L: (iomete kolere) Sed, ĉu mi diris, ke mi konsentis?

H: Ne, Lucino. Virino neniam konsentas pri opinio de alia; ŝi nur konsentas sian propran opinion esprimitan de alia. Ne estas malfacile diveni vian opinion.

L: (pli kolere) Absurde! Sed, diru al mi, kial ne manĝi ĉevalviandon?

H: Nu... ĉar la ĉevalo estas amiko de la homo. La ĉevalo laboras por ni... trenas la plugilon aŭ la veturilon. La ĉevalo portas niajn pakaĵojn, aŭ portas nin sur sia dorso. Ĝi amuzas nin en la ĉevalkuroj.

L: Nu...ĉu vi iam manĝis bovaĵon?

H: Jes, kompreneble! Kia demando!

L: Nu, la bovino ankaŭ estas amiko de la homo. La bovino donas al ni lakton. En diversaj landoj, bovino ankoraŭ trenas la plugilon kaj veturilon, same kiel ili servis al la pioniroj de Usono.

H: La bovino aspektus tre komika en la ĉevalkurejo.

L: Sed mi loj aplaŭdas la bovon en la areno kun la toreadoro.

H: Tio eble estas vera, sed kiel tio rilatas al la temo pri ĉevalviando?

L: Nu, vi diris, ke vi ne manĝus viandon de ĉevalo pro tio, ke la ĉevalo estas amiko de la homo. Mi simple montras, ke amikeco estas erara premiso.

H: Nu, mi havas alian premison. Supozu, ekzemple, ke gasto vespermanĝas kun ni. Estus embarase se vi donus ĉevalviandon al li.

L: Ho, mi dubas, ke iu povas rekoni diferencon inter la du.

H: Tamen, mi preferas manĝi tian sukplenan bifstekon, kian ni ĵus havis. La mia estis bongustega!

(longa paŭzo)

L: Henriko?

H: Jes, Lucino.

L: Mi havas sekreton.

H: Ĉu vere? Kio estas la sekreto?

L: Ĉu vi promesos ne koleriĝi?

H: Jes, kara mia.

L: Tio ne estis bifsteko, kiun vi manĝis hodiaŭ vespere.

H: LUCINO!!

(kurteno)

*Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkuŝono); Enlande, unu vorto por du cendoj.*

- Aŭstrujo.** F-ino Rosa Prayer, Haymerlegasse 18/7, Wien 16. 15-jara knabino deziras korespondi kun knaboj 16-21 jaraj.
- Brazilo.** Albertino Alves de Almeida, Av. Tereza Cristina 73, Bairro do Prado, *Belo Horizonte* (M.G.). Fraŭlo dez. kor. kaj interŝanĝi PM.
- Brazilo.** Maklera Servo Zamenhof & Co., Ltd., Caixa Postal 945, *Salvador* (Bahia). Serĉas agentojn ĉiulande por vendi al eksterlandaj importistoj varojn el Brazilo (tabako, kafo, led, kotono, ricinsemo, kakao, ŝnur-fibro, kaj tiel plu).
- Ĉeĥoslovakujo.** Miloš Ther, Masarykovo Náměstí 78, *Police nad Metujé*. Deziras korespondi kun Usonanoj.
- Danlando.** Walther Lange, Ge-Kongevej 91a (1), Copenhagen. Kor. pri arto.
- Greklando.** F-ino Cathrine Patsion, Odos Karterias 20, Kipseli, *Athinai*. 16-j. fraŭlino kaj aliaj lernantinoj en sama lernejo dez. kor.
- Japanujo.** S-ro Koichi Kurosawa, Shinsei, *Obase*, Naganoken. 32-jara flegato deziras korespondi kaj interŝanĝi PM kun filatelist(in)oj-mal-sanul(in)oj, sanatorian(in)oj.
- Japanujo.** Ichiro Kawano, c/o Hideo Mori, 261 Chojamaru, Kamiosaki, Shinagawa-ku, *Tokio*. 19-j. studento deziras korespondi.
- Japanujo.** Isamu Yosimoto, Kusama-mura, Atetu-gun, *Okayama-ken*. 26-j.
- Jugoslavujo.** F-ino Jurina Francisko, Tvorniĉtno 9, *Zemun*. Deziras korespondi kun Usonanoj kaj ofertas interŝanĝi PM.
- Jugoslavujo.** F-ino Stana Mlkar, Zibertova Ulice 7, *Ljubljana*. Dez. kor.

### **EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1952**

The Association thanks you sincerely for your support during 1951 and requests that you send your 1952 dues soon. An early remittance would be very helpful and would avoid the extra office work of sending out reminders.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "Associate Membership" (AM) in the UEA. You receive the coupons of the UEA and have a right to the services of Delegates throughout the world.

In addition, there are "Individual Membership" categories in UEA: the *Yearbook* is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and the magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually. Here are Membership Rates for 1952:

EANA membership including UEA	Associate of UEA	Yearbook of UEA	Yearbook & Esperanto
Subscribing member	\$3.00	\$4.25	\$6.00
Sustaining member	5.00	6.25	8.00
Patron member	10.00	11.25	13.00

## POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity. Ask about other titles.

- PRACTICAL ESPERANTO**, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated..... \$ .25
- REED'S PRACTICAL GRAMMAR**, Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price..... .35
- ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE**, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....Paper \$1.50; Cloth 3.00
- UNIVERSALA ESPERANTO-METODO**, Dr. Benson. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....Cloth 6.00
- ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY**, Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....Cloth 1.50
- ESPERANTO (World Language Series)**, Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc..... .25
- WORLD'S CHIEF LANGUAGES**, Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....Cloth 6.00
- AMERICAN POCKET DICTIONARY**, Karl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. Offset edition in paper covers. 80 pp..... .25
- EDINBURGH DICTIONARY**. Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....Cloth .85
- MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY**. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....Cloth 2.50
- FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**. Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....Cloth 2.35
- PLENA VORTARO DE ESPERANTO**, Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....Cloth 4.00  
Rare, exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....Cloth 6.50
- FUNDAMENTA KRESTOMATIO**, Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....Paper 1.65  
Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards....Half-Cloth 2.50
- KARLO**, Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp.. .25
- THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)**. The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....Cloth 2.50
- ESPERANTO SORTIMENTO**. Five books, good reading at low cost: *Akrobato de Nia Sinjorino*, legend of France, 25 pp; *Blanche-Virgulino de Lille*, medieval romance, 42 pp; *Lando de Argenta Akvo*, story of Far West, 48 pp; *Miserere*, music story, & *Tbais*, by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; *Rojujo Ciumiljara*, the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only..... 1.00
- RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS**. Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection... 2.75
- INDIAN BEAD STAR**. Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch.. 1.00
- GREEN STAR PENDANT**. Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia... .75
- ENAMEL GREEN STAR**. Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch... .65  
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch... .65  
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch.... .65  
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only..... .65

**Esperanto, 114 W.16 St., New York 11, N.Y.**

## NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records  
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of Doris Tappan Connor. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. NOW, you can learn Esperanto like a "native"—*better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "Connor Course" is compiled by experts. "Vinylite" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



- The complete "Connor Course" includes the following:
- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
  - (2) Eight complete "Vinylite" double-sided 10" records.
  - (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
  - (4) Personalized instruction and guidance of Mrs. Connor.
  - (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
  - (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
  - (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

**FOR INDIVIDUAL STUDY:** The complete "Connor Course", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

**FOR GROUP STUDY:** Buy one complete master course at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order NOW:

**Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**

